

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTO-
RÖRELSEN I SVERIGE

UTGIVEN AV GEFLE
ESPERANTOFÖRENING

Officiellt organ för Svenska Esperanto-Förbundet (S. E. F.)

N:o 3.
Mars 1914.

Redaktör:
R. PEHRSSON
Kraftverket, Älvkarleö.

Ansvarig utgivare:
W. WAHLUND
Gävle.

Lösnummer 10 öre.
Årsprenumeration 1:20 kr.
Annonspis 5 öre pr mm.



De la jarfesto de Klubo Esperantista de Gävle.
25-an de Januaro 1914.

Några ord om U. E. A.

Redan så tidigt som 1902 eller 1903 fanns ett slags föregångare till vårt nuvarande U. E. A., nämligen »Societo por internaciaj rilatoj», som dock snart avträdde från skådeplatsen. På den tiden var ju esperantorörelsen helt annorlunda beskaffad än nu för tiden. U. E. A:s verksamhet kan dock sägas vara förberedd först genom de beslut, som Esperantokongressen i Genève 1906 fattade om tillsättande av esperantogenter på alla viktigare platser jorden runt. Erfarenheten gav emellertid vid handen, att planmässig och praktisk verksamhet av detta

slag ej var möjlig utan enhetlig och internationell organisation, och så bildades U. E. A. i början av år 1908 på initiativ av herrar Hodler och Rousseau.

Stiftandet av U. E. A. var således framkallat ej endast av den ideella önskan, att skaffa Esperanto ökad användning för att på det sättet göra propaganda för hjälpspråksrörelsen, utan ännu mera av behovet att tillvarataga och utnyttja de möjligheter, som erbjöds genom den utbredning, som det mellanfolkliga hjälpspråket så småningom hade vunnit trots all den ihåliga bluff, vilken var en så väsentlig del av esperantopropagandan under en viss period.

De första stadgarna för U. E. A. antogs provisoriskt den 28 april 1908, och redan efter ganska kort tid räknade förbundet ett tusentals medlemmar och några hundratals ombud. Sedermera har förbundets organisation allt mera utbildats. Oaktat att medlemsavgiften höjts till 1 Sm. (kr. 1,82) för år, räknade förbundet vid slutet av 1913 över 6,000 medlemmar. Denna anslutning torde dock ej få anses som tillfredsställande om man ihågkommer, att endast medlemskap i förbundet berättigar till att av förbundets platsombud fordra upplysningar och tjänster i den omfattning som närmare bestämmes i stadgarna. Dock inträffar det alltför oftast, att sådana framställningar göras hos platsombuden av personer, som ej tillhöra förbundet — och även tillmötesgår, oaktat att någon egentlig skyldighet därtill naturligtvis ej förefinnes.

Det måste därför framhållas, att U. E. A. ej får förväxlas med esperantovärlden i dess helhet, utan är en bland hjälpspråksrörelsens deltagare bildad sammanslutning, som endast indirekt äsyftar propaganda för hjälpspråket och dess utbredande. U. E. A. är således en mellanfolklig organisation, inom vilken Esperanto användes för alla meddelanden. Förhållandena äro ju alldeles enahanda, då vilket som helst samfund inom ett land använder sitt nationella språk, utan att det därför kan antagas att alla de personer, som i dagliga livet använda samma språk, tillhöra det ifrågakommande samfundet.

Dessa rader äro endast avsedda att lämna upplysningar i ett par

ämnen, varom oriktiga uppfattningar visat sig förefinnas hos många. Det må dock få tilläggas att användningen av Esperanto, tack vare U. E. A. och dess platsombud, vid många tillfällen visat sig vara mera ändamålsenligt, än begagnande av vilket som helst nationellt språk.

För några år sedan avled en anhörig till den som skriver dessa rader. Bland kvarlåtenskapen fanns en gammal utländsk premieobligation, köpt på 1860-talet. Det gällde alltså att först taga reda på vad detta papper var värt, och därefter att få det inlöst med det belopp, som befanns vara utfallet. Tack vare U. E. A. klarerades denna sak både snabbare och billigare, än som varit möjligt på något annat sätt. Anmärkas kan, att förfrågan, enligt vad som uppgivits, ett par år förut gjordes utan resultat hos någon bankirfirma i Stockholm, huruvida ifrågavarande obligation var dragen.

Jln.



Nia Jarkunveno.

Helsingborg,
12-an de Jan. 1914.

Dum la lastjara kunveno de Svedaj esperantistoj en Gefle oni deziresprimis, ke proksima jarkunveno havu lokon en Malmö okaze de la »Balta Ekspozicio».

Nenio nun malhelpas al tia aranĝo, ĉar mi sciigis, ke la intereso por Esperanto en Malmö nun estas sufiĉe granda por ree engrupigi la tieajn esperantistojn. Tiacele oni invitis la subskribinton por publike paroladi la 26-an de Januaro pri Esperanto kaj samtempe per malgranda ekspozicio montri la nunan disvastigon de nia movado. Kompreneble mi akceptis la inviton.

Samideanoj! Ni do organizu nian jarkunvenon en Malmö en nuna jaro! — Mi proponas, ke ni aranĝu »Esperantajn tagojn» en Malmö 26-an—29-an de Julio, por ke niaj vojaĝontoj al la deka kongreso en Parizo, antaŭe partoprenu nian enlandan »kongreson», inter ili la premiitoj en la konkurso de »Fyrväplingen».

Kompreneble ni per kiel eble plej plena ekspozicio kaj disdonado de

propagandiloj nepre devas konatigi nian Esperanton al la multnombra publiko ĉe la »Balta» La aranĝon de la ekspozicio la subskribinto prenas sur sin; la elekton de loka komitato li ankaŭ promesas prizorgi.

Plue mi proponas, ke ni sufiĉe frue invitu almenaŭ la samideanojn en Danujo kaj Nordgermanujo al niaj esperantaj festotagoj. Kaj fine mi proponas, ke ni aranĝu monkokolektadon laŭvolan; ĉar ju pli da mono, des pli da sukceso! Tiun aferon plejbone prizorgos nia »La Espero».*

Kun samideana saluto
G. H. Backman.



Stadgefrågan.

Stadgefrågan är en sak, som en nybildad förening först har att ordna och som kräver både tid och arbete — dock ibland kanske för mycket, ty man kan vanligen reda sig med ganska kortfattade stadgar.

Till ledning för nybildade föreningar återgiva vi här de reviderade stadgar, som av Gävle Esperantoförening antagits att gälla från och med innevarande år. De göra emellertid inga anspråk på att vara några mönsterstadgar; de äro endast sådana de synats lämpliga för vår förening, och i vilken mån de för tjäna tagas i användning av andra föreningar, beror endast på dessas lokala förhållanden, på medlemmarnas ställning o. s. v.

Stadgar

för Gefle Esperantoförening,

gällande från och med år 1914.

§ 1.

Gefle Esperantoförening, bildad den 8 mars 1907, har till ändamål att verka för utbredandet och befrämjandet av det av Doktor L. Zamenhof år 1887 offentliggjorda internationella hjälpspråket »Esperanto».

* Certe estus plej bona propaganda okazo por nia afero, se ni povus aranĝi sukcesan esperantan kongreson ĉe la »Balta», kaj la propono de s-ro Backman meritas ĉiun atenton. Ni revenos al ĝi en proksima numero.

Red.

§ 2.

Mom. 1. Inträdet i föreningen är avgiftsfritt, och medgives envar oförvitlig person utan hänsyn till vistelseort eller nationalitet, som erlägger vid inskrivningen löpande årsavgift, och är villig ställa sig föreningens stadgar till efterrättelse.

Mom. 2. Årsavgiften är 3 kronor, vilken erlägges inom loppet av januari månad, och berättigar till gratis erhållande av föreningens organ »La Espero», samt till medlemskap i Svenska Esperantoförbundet.

§ 3.

Mom. 1. Föreningens angelägenheter handhaves av en styrelse på sju personer, bestående av Ordförande, vice Ordförande, 1:e Sekreterare, 2:e Sekreterare, Kassaman, Bibliotekarie, som samtidigt är Materialförvaltare, samt en Rådgivande ledamot. Styrelsen utser inom sig funktionärer.

Mom. 2. Styrelsen är en för alla och alla för en ansvarig för all föreningens omhänderthavda egendom. Den ledamot, som genast till protokollet anmäler sin reservation mot fattat beslut, vare fri från ansvar för detsamma.

Mom. 3. Kassamannen är inför styrelsen ensam ansvarig för omhändertavda medel.

§ 4.

Val av styrelse och 2 suppleanter samt 2 revisorer och 1 suppleant, företages vid årsmötet, vilket hålles på årets första sammanträde, och sker med slutna sedlar om någon så önskar. Samtidigt utses ledamöter i de stående komitéerna, vilka äro Propagandakomitén, Redaktionskomitén samt Festkomitén och vardera bestå av 3 ledamöter, som vid förfall komplettera sig själva.

§ 5.

Ordinarie sammanträde hålles första tisdagen i varje månad. Styrelsen äger rätt sammankalla till extra sammanträde då anledning därtill finnes.

§ 6.

Förslag om ändring eller tillägg av föreningens stadgar skall till styrelsen inlämnas minst 2 månader före årsmötet, för att av densamma förbehandlas och därefter av föreningen godkännas å två på varandra följande sammanträden.

§ 7.

Upplösning av föreningen sker när medlemsantalet sjunkit till 6 personer, och äga dessa då samsammans besluta om användandet av föreningens eventuella tillhörigheter till något esperantiskt syftemål.



Sveda kroniko.

La jarkunveno de la Grupo Esperantista Borås okazis la 26-an de Januaro en la kafejo Manhem kaj la plejmulto de l' membroj partoprenis en ĝi... El la raporto pri la kluba laboro dum la jaro 1913 estis evidenta, ke la grupa evoluo bone marŝis, ke la nombro de l' membroj pligrandigis kaj la grupo mem montras vivecon kaj vigecon.

Ĉiuj membroj de l' estraro estis reelektataj kaj funkcias S-ro Otto Roesel kiel prezidanto, S-ro J. A. Blomqvist sekretario, S-ro Sven Svedén kasisto kaj Albert Sporre bibliotekisto.

La plej gravan punkton de la tagordo formis la demando pri la aliĝo de l'grupo al S. E. F. Post mallonga debato ni decidis, ke la grupo aliĝu al la nomita federacio. Sekve de ĉi-tiu decido ni plialtigis la kvaronjaran kotizajon je 25 oeroj (de 50—75).

Tre dezirinde ja estas, ke ĉiu membro aboni kaj legi la organon de la sveda esperantistaro, nome la gazeton »La Espero». La propono, ke ĉiu membro estu devigita aboni la gazeton, ne povis kolekti sufiĉe da voĉoj; sed oni esprimis la deziron labori kiel eble blej energie por havigi multajn abonantojn por la nomita gazeto. Elektitaj kaj komisiitaj labori en la dezirita direkto estas S-roj J. A. Blomqvist, Sven Svedén, Arvid Roesel, fraŭlinoj Karin Svenson kaj Elsa Ljungqvist.

Por la klubo mem la membroj decidis aboni la gazetojn »La Espero» kaj »La Revuo».

De la estraro estis farita la provo, ricevi lokan por la instruado en ĉambro de l'publika lernejo. Sed ni penadis senrezultate. Ni ne trovis la komprenon kaj komplezon ĉe la lerneja konsilantaro, kiujn nia afero efektive meritas, kaj nia peto estis rifuzita.

La membroj de nia grupo faris la 18-an de Januaro ekskurson al

Almenaŭ apud la lago Öresjö kaj trans la glaciokovrita lago al Långesten, kie ni trinkis kafon dum vigla babilado. En la ekskurso partoprenis 12 personoj, kiuj en la plej bona humuro pasigis kelkajn agrablajn horojn.

Ankoraŭ daŭras la kurso komenigitita en la Novembro de la pasinta jaro kaj havas lokon en kafejo »Manhem» ĉiulunde. Samloke okazas ĉiujarde kunvenoj por la pli lertaj membroj, ĉefe por parola ekzercado. Kafejo Manhem estas nia klubejo aŭ renkontejo kaj de nun rekonebla de ekstere per elpendaĵo portante verdan stelon kaj la surskribon »Renkontejo Esperantista».

Kun samideanaj salutoj
O. Roesel.

Malmö. La intereso por Esperanto en Malmö estas nun ĝojige granda kaj la nova klubo bone progresas. Kiel estraro por 1914 estas elektitaj s-ro C. Billqvist, prez.; direktoro H. Hermod, vic-prez.; kand. J. Pettersson, kor. sekretario; s-ino Anna Hermod, sekretario kaj s-ro C. Rosengren, kasisto.

En la publika kurso de la klubo partoprenas 26 personoj, inter ili 12 malnovaj esperantistoj, kaj en la kurso por bontemplanoj (N. G. T. O.) 12. Krom tio la gvidanto de tiuj du kursoj, kand. J. Pettersson ankaŭ instruas 27 knabinojn el la popollernejo. Oni devas admirti tian laboron.



La "Deka".

X Universala Kongreso de Esperanto, Paris 2—10 Aŭgusto 1914.

Kongresa gazeto.

La organiza komitato eldonas specialan kongresan gazeton, kiun ricevas ĉiu kongresano de post la monato de sia aliĝo. La gazeto aperas ĉiumonate kaj enhavas ĉiujn informojn pri la kongreso kaj pri la kongresurbo. Kunlaboranto por Svedujo estas nia prez s-ro John Lundgren.

El la gazeto ni ĉerpas la jenajn informojn:

La *garantia kapitalo* por la kongreso atingis la sumon de 57,000 Fr. (la 25 de januaro).

Monsubtenoj estas ĝis nun ricevitaj de Librejo Hachette & Kio, 2000 Fr.; Franca Turismo-Klubo 250 Fr.; Urba konsilantaro de Parizo 1000 Fr.; Distrikta konsilantaro de Seine 500 Fr.

La nombro de kongresanoj aliĝintaj la 25 de Februaro estas 1333. El tiuj estas 569 francoj, 248 angloj, 149 germanoj, 69 aŭstroj, 62 hispanoj, 52 belgoj, 52 rusoj, 22 svisoj, 19 hungaroj, 17 italoj, 13 danoj, 11 usonanoj, 10 holandanoj.

Por la korespondado.

La adreso de la kongreso estas »Deka Universala Kongreso de Esperanto, 3 place Jussieu, 3, Paris. Telegrafa adreso: »Esperanto-Paris». La kongreso havas konton ĉe la Ĉekbanko Esperantista, Merton Abbey, London S. W.

La Ekspozicio.

En la ekspozicio aranĝota de la kongreso, oni havas specialan fakon por ĉiuj interesaj dokumentoj, kiuj povas montri la disvastigon de Esperanto en ĉiuj landoj. Ĉiuj grupoj estas petataj alhelpi al la pliriciĝo de tiu fako.

En la ekspozicio estas aranĝata fako por komercistoj uzantaj Esperanton, kiuj estas petataj sendi katalogojn aŭ aliajn eldonaĵojn. La akcepto estas senpaga. Apud la propaganda ekspozicio estos *vendejo*, en kiu Esperantaj komercaĵoj kontraŭ specialaj kondiĉoj povas esti vendataj. Regularo estas ricevebla de S-ro C. Rousseau, 4, place de la République, Levallois-Perret (Seine).

Vojaĝoj.

Diversaj karavanoj estos aranĝata al la kongreso, pri kiuj ni sciigos pli poste.

Ĉiuj la grandaj francaj fervojaj kompanioj konsentis rabaton de 50 % al ĉiuj kongresanoj.

La granda Hamburg—Amerika linio promesis doni 10 % rabaton por vojaĝoj de Hamburg al Cherbourg aŭ Boulogne-sur-Mer.

Kosto en Parizo.

La tutan kongresan semajnon oni povas, laŭ la Kongresa Gazeto, ne lukse, sed tre bone travivi per 50 Fr. al kio oni alkalkulu 10 Fr. por flankaj aferoj.





Amerika. — Skolrådet i *Pickford* har upptagit Esperanto i läroverkets undervisningsplan, och vid John Marschall-skolan i Richmond pågår kurs i Esperanto. Kurser ha därjämte öppnats i *Atlanta, Boston* (vid stadsbiblioteket) och i *Krotona* (Kalifornien). Nya föreningar ha bildats i *Fort Wayne* och *Lemmon*.

Argentina. — En ny Esperantoförening har bildats i *Buenos Ayres* och i *Rosario de S:ta Fe* har öppnats ny kurs.

Brasilien. — Staten Rio har antagit följande lag:

1. Till de statens ämbeten, som tillsätts efter särskild prövning, skola, under annars lika villkor, de sökande äga företräde, som kunna förete av Brasilianska Esperantoförbundet utfärdat intyg över undergången kurs i Esperanto.

2. I alla statens normalskolor, ävensom skolor av andra ordningen, skall undervisning i Esperantogenom av förbundet utsedda lärare tillåtas, där det övriga skolarbetet därav ej hindras.

Belgien. — Kurs har öppnats i *Contich*.

England. — En kurs för blinda pågår f. n. i kungl. blindinstitutet i *Edinburgh*, vilken omfattas med stort intresse. Kurser ha dessutom öppnats i *Auchendinny* och i *Glasgow*, där även en kurs för posttjänstemän sedan en tid pågått. En ny förening har bildats i *Blackpool*.

Finland. — Studenternas Esperantoförening och för. »La Polustelo» i *Helsingfors* anordna f. n. en offentlig kurs i universitetets auditorium. Ny kurs har börjat i blindinstitutet i *Helsingfors*.

Frankrike. — Med anledning av kongressen börjar pressen ägna Esperantorörelsen en allt större uppmärksamhet. Staden Paris har skänkt 1000 fr. och departementet Seine 500 fr. till 10-de världes-Esperantokongressen.

Indien. — Sedan en längre tid tillbaka undervisar prof. J. N. Unwalla i Esperanto vid »Central Hinda College» i Benares. Antalet lärjungar uppgår till ett 60-tal.

Italien. — En talrikt besökt kurs pågår i *Modica*.

Japan. — En ny Esperantoförening, »Formosa Esperantistagrupo»,

har bildats i *Taihok* (Formosa). Föreningen är ansluten till Japanska Esp.-Förbundet och anordnar en kurs med ett 20-tal deltagare.

Norge. — Flera kurser pågå f. n. i Kristiania, bl. a. en i K. F. U. M. med ett 20-tal deltagare. — En norsk Esperantodag förbereder Norska Esperantoförbundet och föreslår den att hållas i Kristiania omkring den 5 juli.

Ryssland. — Avgiftsfri kurs i Esperanto ha efter styrelsens tillåtelse öppnats i realgymnasiet i *Ufa*; 112 deltagare ha antecknat sig. Kurser pågå vidare i handelsskolan i *Astrakan* och i *Ivanovo-Voznesensk* samt i *Velikije-Luki*, där en förening bildats bland studenterna. En ny förening har också bildats i *Sebastopol*, under det en tillämnad förening i *Samara* på grund av några småsaker i stadgarna förgäves sökt erhålla tillstånd från länsstyrelsen. — Styrelsen för handelsbörsen i *Habarovsk* har antagit en resolution, vari förordas införandet av Esperanto i handelsundervisningen.

Spanien. — Stadsfullmäktige i *Sevilla* ha för tredje gången skänkt 1500 pesetas till därvarande Esperantoförening i och för dess propaganda.

Schweiz. — Tre nya kurser ha börjat i *Bern* och en i *Lyss*.



Esperanto i Egypten.

Ett internationellt språk i ett internationellt l. nd.

I marsnumret av *La Revuo skriver* Världs-Esperantoförbundets »delegito» (ombud) i Alexandria följande om Esperantorörelsen i Egypten:

Det synes, som om Esperanto ingenstädes vore så av behovet påkallat som i Egypten. Varje europeiskt och amerikanskt land har här talrika representanter, vilkas antal, om icke större, åtminstone är lika stort som de verkliga egyptier-arabernas. För att leva i Egypten är det därför nödvändigt att tala åtminstone en fyra-fem språk: franska, engelska, arabiska, grekiska och italienska, men icke ens detta räcker till för att bli förstådd överallt.

I Egypten är allting internationellt: handel, press (tidningar

på sju språk) och t. o. m. domstolar, i vilka fyra språk äro antagna såsom officiella. Det är därför möjligt i en process, att yrkandet är avfattat på engelska, svaret på arabiska, talet på italienska och domslutet på franska. Här finnes ett verkligt behov av Esperanto!

Esperantorörelsen i Egypten daterar sig officiellt från januari 1908, då i *Khartum* (huvudstaden i egyptiska Sudan) bildades en första Esperantoförening i »amerikanska missionen». Denna förening hade genast god framgång, en mängd lärjungar undervisades i Esperanto och missionärerna arbetade nitiskt; den halvofficiella tidningen »Sudan Times» publicerade och publicerar ännu ofta gynnsamma artiklar om vår rörelse. I Sudan är således vår rörelse säkert grundad, ty amerikanska missionens esperantister ha ett utomordentligt stort moraliskt inflytande och auktoritet.

I den egyptiska huvudstaden *Kairo*, bildades 1910 »Egyptiska Esperantoförbundet», gynnat av regeringen, allmänheten och pressen. »Egyptian Gazette», »Bourse Egyptienne», »Misr» hälsade den på skilda språk.

Från denna tid började en livlig propaganda för vår rörelse — dels av några få men sanna esperantister, dels av dr. H. Šipek, som gjorde sitt sjukhem i Heliopolis (vid Kairo) till ett verkligt Esperantohem. Och vår sak går synbarligen framåt.

I den engelska arméen arbetar ivrigt S-ro G. Lee, sekreterare i Egyptiska Esperantoförbundet.


Som resultat av deras förenade ansträngningar, kan man nu påträffa esperantister i stort antal i de egyptiska städerna. Förbundets huvudbyrå förenar dem alla.

För ej länge sedan (1 dec. 1913) bildades i *Alexandria* »Societo Esperanto», ansluten till förbundet. Trots att Esperanto hittills varit nästan okänt, har den redan haft en viss framgång. Öppnade kurser besökas väl; varje vecka anmäla sig nya medlemmar.

Esperantorörelsen har nu således i Egypten starka centra, som ha medlemmar av mer än sju nationer: engelsmän, araber, fransmän, tyskar, greker, italienare, ryssar o. s. v., och vi ha nu skäl att tro, inom en kort tid skall Egypten, detta »internationella land», använda det internationella språket mer än något annat land, ty där ha vi »internationella förbindelser» inom landets gränser, i dagliga livet.

Men vi måste gå till väga på ett helt annat sätt än våra utländska meningsfränder, ty den idealistiska ungdomen, som är så lätt mottaglig för och av hjärtat drages till esperantismens heliga idéer, fattas nästan alldeles i Egypten. Våra unga utbildas i europeiska skolor, och vårt arbetsfält, för visso ej så lätt, är till största delen bland alla slags affärsmän, icke alltför idealistiska. Men varje mänsklig själ har sin orörda, rena vrå — och därför må vi arbeta och hoppas.

G. Wilken.



Tia estas la mondo.

Tri Limerikoj.

Estis kuracisto en Ĉikago,
kiun Amoro trafis per sia sago.
Li sin ne ŝirmis per vakcino,
nek sin kuracis per medicino,
ĉar mankis dononto de l'pago.

Holandano en Rotterdamo
estis posedanto de panoramo.
Kiam li trovis publikon
li montris gajan mimikon,
sed tion ne menciis la programo.

Intrigo okazis en Parizo
por trompi la mondon per surprizo.
Sed Esperanto tamen progresis
kaj la atenco ne sukcesis,
kvankam partoprenis markizo.

Rimarko: »Limeriko» estas nomo de absurda versaĵo laŭ karakteriza plano. La enhavo estas neniom konsiderata laŭ senco aŭ prudento, sed la ĉefa afero estas ia surpriza rimo, ĝenerale al iu loka nomo. Limerikoj troviĝas ankaŭ en la sveda lingvo, kiel ekzemple:

»Det var en herre i Sala
som lärde sin hund att tala,
men när hunden fick veta
vad sakerna heta,
så satte han herrn på det hala.»

La nomo laŭdire devenas de la Irlanda urbo Limerick, kies nomo estis uzata en tre populara tiaspeca versaĵo. — La vorto estas konsider-ebla kiel internacia.



La laborulo.

En nia lasta numero de la Espero s-ro Paul Nylén pritraktis la interesan enketon de »Esperanto» pri la estonteco de Esperanto. En sia antaŭparolo de la respondaro, la direktoro de la gazeto, s-ro Hodler, finas per la suba skizo.

... Mi estis eltironta konkludojn el la supraj pripensoj, kiam meze de duonkonscia cerbumado, prezentigis al mi subite, mi ne scias kial, la bildo de mia amiko Laborulo. Utilos versaĵe, ke mi lin prezentu, ĉar de multaj el ni li ne estas bone konata. Sinjoro Laborulo ne estas tre eminenta persono. Malofte vi vidos lin sur estrado. Se li tamen kuraĝas ekparoli — cetere ne per tre brilaj frazoj — tio estas pli por esprimi opinion kaj ideon, ne ĉiam malpravon, ol por ĝui aplaŭdojn. Al la gazetoj li tre malofte sendas »literaturajn» tradukojn (tion li faris nur, kiam li estis lernanto) kaj mi ne timas pretendi, ke li eĉ ne faris versaĵon. Sinjoro Laborulo estas modesta oficisto, kiu fininte sian ĉiutagan laboron, dediĉas la liberajn horojn al nia afero. Pri esperantista politiko li malmulte sin okupas, kaj, verdire, mi suspektas, ke li ne ankoraŭ havas pretan solvon por sukcesigi Esperanton, sed unu aŭ dufoje en la semajno Sinjoro Laborulo faras Esperantan kurson. Li penas ne sole instrui la lingvon, sed ankaŭ ĝin utiligi, tiel ke liaj instruitoj ne perdu sian tempon. Li atentigas ilin, ke Esperanto estas viva lingvo kaj kiel ĉiu tia lingvo devas esti respektata. Li gardas ilin je ŝanĝemo aŭ gramatikomanio, sed same gardas sin insulti tiujn, kiuj ne pensas same. Kompreneble la duono de la lernantoj forkuras, sed tio lin ne senkuraĝigas. Li scias, ke inter la homoj estas amaso de amatoroj kaj malobstinuloj. Li penas eduki la restantan duonon. Tiel lia laboro neniam estas tute vana. Sinjoro Laborulo, se mi ne eraras, estas sekretario aŭ kasiso de la grupo. Oni ŝatas lin, ĉar li havas ordon. Bona administranto li estas. Ne multon li promesas, sed kion li promesas, tion li faras ĝustatempe. Mi tre dubas, ĉu li estus kapabla fari teorian disertacion, ĉu Esperanto estas nur lingvo aŭ ĉu ĝi estas socia movado, sed ĉiokaze mi scias, ke kiam li ricevas leteron, li ĝin legas kaj respondas. Kvankam li

estas fervora grupano, membro de nacia societo kaj eble ankaŭ de faka grupigo, li akceptis esti Delegito de UEA. La cirkulerojn, kiujn li ricevas, li penas plenumi. Li ne tuĵ skribas: »Senutile estas klopodi, ĉar ni ne sukcesos» aŭ »niaj samurbanoj estas tre indiferentaj» — sed li almenaŭ provas; Vere, li ne ĉiam sukcesas, sed almenaŭ el kelkaj tiaj klopodoj, kelkaj havis pozitivan resultaton. Mi neniam aŭdis, ke en iu ajn kongreso li kompetente parolis pri la diferenco inter per-kaj poresperantaj organizaĵoj, nek ke li severe admonis UEA resti en la limoj de ĝia agado, sed lia grupo eldonis gvidfolion, kiun UEA disdonis. Ĉu oni kuraĝos kredi, ke tiu strangulo ne ĉiam surportas la verdan stelon, nek al ĉiuj ajn personoj parolas pri Esperanto? Tamen, la elektitaj personoj, kiujn li varbis, estas seriozaj kaj fidelaj al nia movado. En la urbo li ne estas konata kiel fantaziulo, kiu senĉese ripetadas la vorton Esperanto. Ne, oni respektas lin. Glumarkojn li ne kolektas (verdire li tion permesas al sia knabeto), sed li regule pagas siajn kotizaĵojn kaj abonojn. Mi devas aldoni, ke li sincere kantas »La Espero» ĉe la kongresoj kaj same sincere kredas, ke la amo al la homaro — kiun Esperanto ĝermigis — ne forigas la amon al lia patrujo — sed li ne ĉiam havas en la buŝo la vorton »frateco» kaj »amo», ĉar li malprecize konscias, ke tro ofta uzado de tiuj noblaj vortoj forprenas iom da ilia sankteco. Fine, mi scias, ke S-ro A., la vicprezidanto de la grupo, ne plaĉas al li. Li tamen ne ankoraŭ insultis lin, filozofie li premas lian manon en la intereso de l'paco, kvankam vere... Cetere, mia konatulo, mi tion forgesis diri, estas nek heroo, nek apostolo, nek pioniro. Li estas simple... Laborulo.

* * *

Delogite, de la bildo de mia amiko Laborulo, mi ne plu povis konkludi. Mi ankaŭ ne plu bezonis...

Ĉu Sinjoro Laborulo havas multajn samspeculojn en Esperantujo? Mi ne kuraĝus jese respondi, sed ĉiokaze mi scias, ke de ilia multeco, pli ol de tia aŭ alia teorio, dependas niaj estontaj progresoj. Unue vivi, poste filozofi...

H. Hodler.



La fajro aperas la unuan fojon.

El »La granda kolero»
de Olof Högborg.

Sur la blublanka neĝdezerto nigra punkto moviĝis al glaciĝinta Laplanda marĉlago sub neĝkovraĵo tiel vasta kaj helblua, kiel povas esti nur ĉiom da neĝo de la mondo sub la tuta plenblua ĉielo ĝis ties tertuŝejo proksime post arbarrando kiel eble plej malfacile videbla, la maldiversa limo de la vastega vintra ebenaĵo.

La nigra punkto estis lupo serĉanta sian manĝaĵon — mortigema, granda kaj forta lupu kun tre malferrita buŝejo, multehara ĉe piedoj kaj vosto. Ĝi jam ne memoris tiun tagon, en kiu ĝi lastfoje manĝis, kaj ĝi ankaŭ forgesis, kiel la manĝo tiam gustis. La ventro malvastigis tiom, ke ĝi estis sub la dorso kvazaŭ intesto enhavanta nur ian mukan kraĉfluidaĵon. Malsattremoj iaforte movis tiun ĉi en la gorĝon de la lupu, kiu ĉe la naŭzo fermis la buŝon, kaj la muko tiam fluis ĉe la buŝanguloj kiel du gluaj, blankaj kordoj, tuj glaciĝantaj kiel rompigemaj glacisagoj dise falantaj sur la neĝkruston.

La lupu haltis por serĉi kaj aŭskulti pri la manĝaĵo. Kvazaŭ pintaj nuboj ekster la mondo aperis la okcidentaj montoj tiel blanke kiel morditaj kaj paliĝintaj ostoj. Kun malvarma kaj sangruĝa ridaĉo trans la blua dezerto ĉe la mondlima branĉobarilo la granda fajrokulo — la brulanta okulo de la granda unuokula mondlupo — troege granda kompae kun la marĉbioj, sed kiel tiuj maltaŭga por manĝo. Nenio estis aŭdebla. Neniu kamarado, neniu monto respondis la malgajan ĝemblekon de la lupu. Sed, jen malforte aperas io strange flavruĝe sur la nigra arbaraltaĵo. Ĝi eble estas la manĝaĵo, kaj la lupu komencis kuradon por veni tien.

En la nigra vespero ĝi post mult-hora kurado atingis la bordon antaŭ la sunflanka deklivo de senarbigita krutaĵo ĉe la arbaro, kiu dum la proksimiĝo kreskis pli kaj pli granda. Kaj tie nun vidiĝis la flavruĝaĵo, ankaŭ ĝi pligrandiĝinta, kiel fantomo leviganta el la neĝo, kun fasko el fulgo kaj fajreroj alte sur la ĉielo. Estis fajro el la neĝamaso, eble la fajro de la infero. La lupu metis la voston inter la malantaŭpiedojn, kaj mi ne scias pri ĝi ion, pli ol tio, ke ĝi rekuradis trans la marĉlagon.

Tradukis *Jln.*

La plej bona blazonŝildo.

De J. L. Saxon.

Estos edziĝa festo en la kastelo kaj oni neniam aŭdis pri simila edziĝofesto. La posedantino de la kastelo edziĝos kun filo de parcelulo.

Kiam ŝi estis nur trijara, li — kiu estis kvar jarojn pli aĝa ol ŝi — savis ŝin el droniĝo. Li estis invitita al la kastelo kaj tial ke li kondukis sin bone, li estis proponita reveni. La du gejunuloj estiĝis tre bonaj amikoj kaj kiam la juna grafino — Elisivo estis sia nomo — de unu aŭ alia kaŭzo estis nekonsolebla, oni ne povis agi alie, ol peti Karlon alveni.

Kaj kiam Karlo montris sin havi bonan studkapon, la grafo decidis pagi al li por studi. Karlo montris la plej grandan emon por arĥitekturo kaj dediĉis sin al tio.

La grafo mortis. Li tamen antaŭ sia morto prizorgis, ke Karlo de la heredaĵo ricevos sufiĉe da mono por daŭrigado de la studoj. Neordinare frue li ankaŭ estis preta por sia metia perfektigo.

Lia unua problemo estis rebonigi la malnovan kastelon. La du gejunuloj renkontiĝis ofte kaj unu tagon okazis, ke ili diris, ke ili amis unu la alian. Estis en realeco ŝi, de kiu tio okazis, kaj ŝi konfesis, ke ŝi amis lin de post sia plej juna infaneco. Estis simile kun li, sed li plej kredeble neniam kuraĝus diri tion, se ne lia koro fakte estis surprizita.

Ili komprenis, ke estos malfacile venki la kontraŭstaron de la maljuna grafino — ili konis ŝian grandegan familian fieron. Kaj ŝi neniam konsentis, malgraŭ la klarigoj de Elisivo: »Karlo aŭ neniu!» kaj la patrino bone sciis ŝian firman karakteron.

Multaj petis ŝian manon, sed Elisivo respondis al ĉiuj, ke ŝia koro por tempo kaj eterne estis ligita al la infaneca amiko. Nun la maljuna grafino estis mortinta kaj Elisivo — kiu ne estis pli ol 25-jara, sekve en la aĝo, kiam la virino estas plej bela kaj delikata — iris por festi sian unuigon kun Karlo.

Kiam la edziĝo-partoprenantoj eniris la pordegon de la kastelo, troviĝis tie ornamaĵo kun du blazonŝildoj, unu apud la alia. Unu montris ŝian ŝildon, la alia la emblemon de arĥitekturisto.

Kortuŝite Karlo prenis la manon de sia Elisivo. »Tiel bone kaj bele agita de vi», li diris.

»Estas efektive honoro por mi, ke vi permesas mian ŝildon pendii apud la via», ŝi diris. »Mi heredis la mian, sekve nenion faris por ĝin ricevi. Kaj ĝiaj tri fajrolangoj estas ankaŭ dubebla honoro al la parenaro. La praavo de mia patro ricevis ilin en sia ŝildo, ĉar li en milito sukcesis bruligi urbon. Ĉiun la nepriparoleblan mizeron, kiu sekvis de tio, oni bone povas kompreni. Vian ŝildon vi akiris mem. Ĝi estas signo de via arto kaj antaŭ ĉio, ke vi estas unu de ili, kiu konstruas. Tial ili estas konvenaj unu apud la alia, la malnova barbarajo, kiu detruis; la novo kiu kreas. Estas la novo, kiu kompensas la pekojn de miaj prauloj — mia kavaliro, mia reĝo!»

El la sveda de

E. Adamson.



La Esperantistaro kiel popolo.

(De W. Hahn.)

»Strato de la Popoloj» estas la nomo de la ĉefa vojo en la Mond-ekspozicio de libroindustrio kaj grafikaj artoj. Ĝi estas flankumata per la pavilonoj de la diversaj nacioj. Francujo, Svisujo, Italujo, Austrio, Hispanujo, Portugalujo, Anglujo, Holando, Danujo, Rusujo kaj Brazilujo konstruas jam nun siajn proprajn domojn, por montri en ili la bonan staton de sia libroindustrio.

La Leipziga Mondekspozicio superas ĉiujn ĝisnunajn ne nur per sia grandeco, graveco kaj tipeco, sed ankaŭ per la fakto, ke unu popolo oficiale partoprenas, kiu ĝis nun neniam estis reprezentita, nome la popolo de la Esperantistoj.

Ke la esperantistaro estas popolo, tion ĝi pruvas plej bone per la Esperanto-Pavilono, kiu fariĝis ebla dank al la monoferoj de la gesamdeanoj. Nuntempe ĝi estas konstruata, bela romana domo, ornamita per la verda stelo, inda hejmo de nia afero. Kiel la domo mem, kiu pro la prefera situacio ĉe la »Strato de la popoloj» je efikega loko apud

la domoj de Francujo, Italujo kaj Brazilujo devas esti vidata de ĉiu el la miloj da vizitontoj, tiel ankaŭ la enhavo de la pavilono nekompareble propagandos nian aferon. Ĉiu devas konvinkiĝi ĉi tie, ke Esperanto vivadas, ke ĝi estas forta, ke jam ekzistas tuta esperanta popolo, kiu en sia propra domo montras amason da interesegaj ekspoziciaĵoj. Ĉu ankaŭ vi, kara samideano helpis ĉe tiu grava entrepreno koncernanta la tutan esperantistaron? Ĉu vi ne volas apogi aferon, kiu ebligas, ke la esperanta popolo unufoje aperas oficiale inter la diversaj nacioj, kiu estas kapabla, havigi al nia movado sukcesegon? Dank al la donacoj de multaj sindonaj gesamideanoj la ĉefsumo por nia konstruaĵo estas pagita. Sed tame estas tute necesa mono kaj denove mono, por ke la enhavo de la domo, kiu estas nun kunportata el la tuta mondo, estu nepre inda al Esperanto. Ni tre ege petas vin, kara samideano, helpu ankaŭ vi, por ke tiu por Esperanto gravega okazo, fari impresan propagandon ne pasu neuzate. Ankaŭ tre malgranda mondonaco, eĉ respondkuponoj, estas dankege akceptataj de la Saksa Esperanto-Instituto, Leipzig, Dolzstrasse 1, kiu aranĝas la tutan aferon. La kvitancojn oni legas en »Ĉirkaŭ la Mondo«.

En la Esperanto-domo troviĝos antaŭ ĉio bona statistika materialo montrita grafike. Nur tiamaniere ni efike povas pruvi la grandegan evoluadon de nia mondlingva movado. Ankaŭ ĉe tio ni bezonas gehelpantojn, kiuj sendu al ni la nombrojn de la grupoj ekzistantaj en ĉiu lando kaj la nombrojn de la grupoj dum la lastaj 10 jaroj. Plue apartaj risortoj, ekzemple Esperanto kaj turismo, (sendu gvidlibrojn kaj gvidfoliojn!) Esperanto kaj industrio, (sendu katalogojn!) Esperanto kaj lernejo — estas videblaj en la Esperanto-domo.

Sendube la Esperanto-pavilono en la mondespozicio estos efikega propagandilo, kiu devas havigi al la mondlingvo grandegan sukceson.



Samideanoj!

Abonu "La Espero"!



Armand Berlande.

I Villeneuve-Saint-Georges utanför Paris avled den 13 januari i en ålder av 46 år Armand Berlande, lokomotivmästare vid Paris-Lyon-Medelhavsbanan.

Berlande var sedan flera år en bland hjälpspråksrörelsens mest hängivna anhängare. Internationella Esperantistiska Järnvägsmammaförbundet har i honom förlorat en av sina mest intresserade medlemmar. Såsom människa var han en i högsta grad sympatisk person — blygsam och anspråkslös, men dock modig och oförskräckt — hjärtlig och tjänstvillig, men på samma gång viljefast och målmedveten.

Tor Fredriksson.

Nia samideano *Tor Fredriksson* ne plu vivas. Mi apenaŭ volas kredi la fakton... Kelkaj horoj antaŭ lia foriro, mi ja parolis kun li, kaj li estis tiel sana, tiel ĝoja, kiel iam antaŭe. Nun li ne plu vivas, ĉar li mortigis sin mem. Kial? Pro malfeliĉa amo. Kia malĝoja sorto!

Tor Fredriksson estis nova esperantisto, membro de Klubo Esperantista de Stockholm *Verda Stelo* kaj de U. E. A. Li partoprenis en nia movado nur dum unu jaro. Kiam mi gvidis kursojn en Esperanto por la studentoj en »Stockholms Högskola« (Altlernejo de Stockholm), li fervore lernis nian lingvon kaj fariĝis entuziasma esperantisto. Li ne multe brilis eksteren, sed lia laboro kaj apogo estis por ni tre valora. Antaŭ sia enskribiĝo en »Stockholms Högskola« 1910 kie li studadis en la naturscienca fakto, li estis, kvankam juna, tre ŝatata infana instruisto en unu el la plej altrangaj lernejoj por geknaboj en Stockholm. Bona pedagogo, klarvida kaj ideriĉa homo, li estis, kaj lia perdo estas por ni des pli malĝoja, kiam la enkonduko de *Esperanto* en la svedajn lernejojn nun staras sur la tagordo. Li estis ankaŭ membro en la »Komitato por enkonduko de Esperanto en la lernejoj kaj por ŝtata subvencio.« kie lia lingva kapablo kaj sperto pri instruado de infanoj multe helpis la Komitaton en ĝia malfacila laboro kaj grava tasko. Tor Fredriksson

Esp.-svensk och svensk-esp. ordbok

Pris 60 öre portofritt.

Hjärtstads förlag, Kristinehamn.



Gävle Esperantoförening

avhåller ordinarie möte tisdagen den 7 april kl. 8 e. m. å lokalen S. Kungsgatan 8. Därvid förekommer bl. a. SÅNG och MUSIK. Alla välkomna! Styrelsen.

estis lastatempe instruisto en lingvoj kaj la pli alta matematiko en *Nya Privatskolan* (La Nova Privatlernejo) en la ĉefurbo. Multe dank' al li, mi ankaŭ siatempe sukcesis enkonduki Esperanton en tiun lernejon por la pli alta reala instruado. Ke Nya Privatskolan *oficiale* akceptis Esperanton en sian instruon programon, do ne estas nur mia merito. Por la nuntempa evoluado de la aviatiko, la perdo de Tor Fredriksson estas sentebla. Dum multaj jaroj li eksperimentis kaj plibonigis, sian flugmaŝinan sistemon, kaj kiel amiko mi povis vidi lian seriozan kaj sukcesplenan laboron. La modelo de lia flugmaŝino jam estis preskaŭ tute preta, kaj nun — li estas for...

En la floro de sia aĝo li foriris, lasante post si la bildon de genia, laborema kaj sentema homo.

Pacon al la cindro de la kara samideano!

Tor Fredriksson estis frato de la nuna estimata prezidanto de »*Verda Stelo*« en Stockholm, Charles Fredriksson. Li estas naskita la 19-an de oktobro 1886 kaj faris sian studentan ekzamenon 1906.

Ni esprimas la profundajn bedaŭrojn pro la tro frua morto de la bonega homo al la funebranta familio. *Teodor Rosengren.*

Korespondado.

Anonceto pri korespondado kostas 40 oeroj (2 respondkuponoj).

Bodø (Norge). — S-ro Sig. Hjole deziras korespondadi per il. poŝtkartoj kun svedaj samideanoj.

Dresden (Tyskland). — S-ro Paul Philipp, Marksstr. N-ro 14, deziras interŝanĝi vidajkartojn kun svedaj esperantistoj.

HERRAR

ekipera sig bäst och fullständigast hos

Axel Lidholm

Drottninggatan 30 - - GEFLE

Josef Wikströms

Tobakshandel
GEVALIAPALATSET - GEFLE

Thermos-Flaskor 2:50

Lösa glas 1:25

hos

A.-B. Axel Karlstrand

Rikst. 12 27 GEFLE Rikst. 12 27

La Nova Testamento.

Nya Testamentet på Esperanto.

Inb. i läderband med förgyllt snitt
2:50 kr. portofritt.

La Esperos expedition, Gefle

"LA ONDO DE ESPERANTO"

MONATA ILUSTRATA REVUO

(fondita en la jaro 1909).

Ĉiu abonanto de la j. 1914,

krom 12 n-roj de l'gazeto, — ricevos
donace belan Esper. libron:

**Esperanta Poŝtkalendaro por
la jaro 1915.**

»La Ondo» aperas akurate la 1-an daton,
novstile. Ĉiu n-ro havas 16—24 paĝ.
Formato 17×26. Bela kovrilo.

Literaturaj konkursoj kun premioj. Port-
retoj de konataj Esperantistoj. Diversaj
ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tra-
dukita. Plena kroniko. Bibliografio. Nia
lanterno (kontraŭ Ido). Amuza fako (kun
premioj). Anekdotaro. Korespondo tut-
monda. (Poŝtk. ilustr.)

Anonco en Koresp. Fako—3 respondkuponoj

La abonpagon (2 rubl.=2, 120 Sm.) oni
sendu al librejo »*Esperanto*» (Moskvo,
Lubjanskij proezd, 3, Rnslando) aŭ al
aliaj Esper. librejoj—poŝtmandate, res-
pondkupone, papermone, per bankĉekoj aŭ
per transpag. de Esp. ĉekbanko.

Ozarowsky & Pehrssons

Bleck- & Plåtslageri

N. Kopparslagaregatan 15, Gefle

o TELEFON 188 o

Kiam vi bezonas
viandon, mendu
ĉe

FRANS A. OLSON

Telef. 34 □ GEFLE □ Telef. 34

Central- och Jernvägshotellen

GEFLE

REKOMMENDERAS!

C. J. LINDH

BOK- & DISTRIBUTIONSAFFÄR

S. FÄLTSKÄRSGATAN 19, GEFLE

Rekommenderar sig vid behov av
Böcker, Tidskrifter och Häftesarbeten.

RIKSTELEFON 16 97.

PROVU LA KOPIOKRAJONON

ESPERANTO!

3:— kr. por dekduo. 30 oeroj por unu.

W. WAHLUND, GEFLE

Wickmans Kappaffär

NORRA KUNGSGATAN 7 - GEFLE

Vid Rådhusplanaden.

Kappor o. Promenaddräkter i stort uryal.
Beställningar emottagas o. utföras förstsk'assigt.

RIKSTELEFON 1391.

Kort Lärobok i Esperanto

för nybörjare av

ALBIN ZACHRISSON

Läroverksadjunkt, Karlstad.

Rekvireras pr kontant hos förf., Karlstad.

PRIS 75 ÖRE.



N. Lundgren

GEFLE - Interurba tel. 151

Kamentuboj por fabrikoj.

Pli ol 700 konstruitaj.

Riparoj dum uzado.

Fulmkonduktiloj estas muntataj.

Propra brikejo en Upsala.

Plej granda firmo por konstruo de
fabrikaj kamentuboj en Skandinavio.

Argenta medalo en Stockholm 1897
> > > Gefle 1901
> > > Norrköping 1906



*Presenter inköpta hos
Juvelerarefirman*

A. U. Wahlberg, Gefle

äro alltid välkomna.

Filial i Bollnäs.

Carl Larssons

FOTOGRAFIATELIER

NYGATAN 34

Rekommenderas!

TELEFON 357

Nykterhetsvänner!

Prenumera på eder egen Esperanto-
tidning

La internacia Abstinenta Observanto

Prenumerationspris Kr. 2:80.

Provnummer mot porto.

Prenumerationer i Sverige mottages
av E. Adamsson, 4: 27, Gävle.

La Espero

utgives av Gefle Esperanto-
förening och utkommer
omkr. den 15 i varje månad.

Lösnummerpris 10 öre.

Prenumerationspris Kr.
1: 20.

Prenumeration kan ske
dels direkt hos tidningens
expedition, Gefle, dels ge-
nom återförsäljare eller på
posten.

Återförsäljare önskas på
varje plats! Provision om
flere exemplar tagas!

Prenumerantsamlare er-
hålla 20 öre för varje anskaf-
fad prenumerant, om minst 5
prenumerationsavgifter in-
sändas samtidigt.

Abonprezo ekster Svedujo
1:00 Spesmito. (12 numeroj).

Specimeno kontraŭ re-
spondkupono. Mendo ĉe
R. Pehrsson, 3—23, Gefle.

Finna Esperantisto

Officiala monata organo de Esperanto-Asocio
de Finnlando. o Abonprezo 3:— Fmk.

Adreso: **S-ro Albin Sandström,**
11, Köpmansgatan, Helsingfors.